




ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, TEL-AVIVO

N-ro 71, aprilo 1980



האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

העורך: אלכסנדר מנור

חוברת 71-אפריל 1980

ENHAVO

La novtrovita letero de Zamenhof - A. Manor	1.
Letero de L. L. Z. al Bilu - Ĥ. Haroun	3.
Henry Phillips - la unua e-isto en Ameriko - B. Golden	4.
Tago de la Floro j. Giladi	7.
La Ĥaĥama buĉilo k la segilo E. Ŝteinberg	
(trad. J. Hecht)	8.
La militkaptito - U. Oren (trad. O. Ginz)	10.
Freŝan fromaĝon! J. Kohen-Cedek	12.
Kontraŭlingva batalo Ŝ. Mizeruĥa	14.
Jam ne gravas D. Mager	15.
Rabatado en banko kiel kutime!!! E. Kiŝon	
(trad. G. Ziegler)	16.
La liro forpasis. Vivu nova siklo J. Ŝemer	19.
El nia Movado kaj agado	20.



VOLAS KORESPONDI

Kåre Jensen, Strandgt. 21, 3700 Skien, Norvegio. Interesata pri Israelo kaj poŝtmarkoj. 59-jara. (Ankaŭ kun pensiuloj).

Antonin Bombionka, Sokolovská 1178, 708 00 Ostrava-Poruba IV, Ĉeĥoslovakio; 45 jara, edziĝinta, ŝatas muzikon (klasikan, popularan), kolektas pupojn vestitajn per naciaj kostumoj.

Lempi Kinnunen, 70200 Kuopio Luistelijantie - 2 B 1, Kuopio, Finnlando: 58-jara vidvino, instruistino, juneca, havas 16-jaran filon, venos printempe al Israelo. Interesiĝas pri: historio, manlaboroj kaj ekzercoj.

Katona József, Hódmezővásárhely, Balassa u. 8. Hungario H.-6800: 20-jara fraŭlo, librovendisto, interesiĝas pri azia kulturo, sondiskoj, ĝazo, religia kulturo k.t.p.

Buta Ion, str. Nouă, BL. A5 5C.A. ap. 17, Násáuo 4500, Jud. Bistrica-Nasauo, Rumanio - 32 jara, deziras korespondi tutmonde per bildkartoj, interŝanĝi p.m., fotojn de geaktoroj, kaj gramofondiskojn.

ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO - LIGO

EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel Avivo

N-ro 71, aprilo 1980

Ĉefredaktoro -

Aleksander Manor

redaktoro -

Josef Ŝemer

LA NOVTRUVITA LETERO DE ZAMENHOF

En nia lasta numero de Israela Esperantisto (70) skribis Ĥ. Haroun pri letero de Zamenhof al "Bilu" kaj citis la klarigon de N.Z. Maimon pri ĝi.

Mi ekzamenis tion kaj evidentiĝis, ke s-ano Maimon (La aŭtoro de la libro "La Kaŝita Vivo de Zamenhof") eraris, kiam li identigis tiun novtrovititan leteron kun letero, kiu aperis en la verkoj de Drujanov, kiu tute ne estas de Zamenhof, sed nur lia nomo estas tie menciita. La nova letero trovita en la "Cukerman-Dokumentoj" en kolonio Gedera estas certe de Zamenhof kaj ĝia dato estas malfrua.

Tiu ĉi nova letero estis trovita pere de la historiistino Ŝulamit Laskov, kaj ni ricevis permeson dumtempe publikigi nur ĝian enhavon, sed ne la tutan originalan tekston skribitan ruse. (Tre mallongan ekstrakton de tiu ĉi letero publikigis Ŝulamit Laskov en sia nun aperinta hebrea libro "Habluim").

Tiu ĉi letero de Zamenhof estas respondo je letero, kiun sendis al li la Biluim de Israellando. Por bone kompreni la enhavon de tiu ĉi nova grava letero, ni klarigas koncize la celojn de Bilu-movado kaj la rilatojn de Zamenhof kun ĝi.

La pogromoj en Ruslando dum la jaroj 1881-2 vekis ĉe la judoj liberigan nacian movadon, la Cionismo-movadon de aŭtoemancipacio de la juda popolo, la strebadon al nacia sendependeco en sia malnova - nova patrio, Israellando (Cion), kun kiu ili neniam rompis kontakton. Ankaŭ Zamenhof fariĝis tiam Cionisto. Dum la pogromoj estis Zamenhof studento en la universitato de Moskvo. En aŭgusto 1881 li revenis al Varsovio, kie la 25-an de dec. 1881 estis pogromo kiu daŭris du tagojn.

La judaj studentoj en Ĥarkov fondis tiam (21.1.82) aktivan grupon kiun ili nomis "Bilu" kaj kies celo estis propagandi enmigradon al Israellando. Ili malfermis filiojn ankaŭ en aliaj rusaj urboj kaj kontaktiĝis ankaŭ kun Zamenhof en Varsovio por tiu celo. La unua grupo de Bilu-movado venis al Israellando la 6-an de julio 1882. En 1883 ili sendis de Israellando leteron al Zamenhof en Varsovio. Li respondis al ili la 18-an de novembro 1883. Tiu ĉi letero estis nun trovita en la israela kolonio Gedera.

En tiu ĉi letero rakontas Zamenhof, ke kiam la delegacio de Bilu-organizaĵo vizitis lin en Varsovio dum la jaro 1882 kaj varbis adeptojn por sia movado, ili vekis ĉe li grandan intereson kaj li pritraktis la eblecon veturi kun ili al Israellando. Zamenhof substrekas, ke li kredis, ke la anoj de Bilu-movado faros multe por la juda popolo, kiel bravaj pioniroj kaj ke nenio timigas ilin. Sed jam forpasis dua jaro de la tempo kiam la unua ilia grupo venis al Israellando kaj ili ankoraŭ nenion establis kaj fondis. Zamenhof skribas, ke dum tiu tempo ili jam povis fondi en Israellando kolonion, kiel imitindan ekzemplon, kiu povus absorbi pliajn enmigrintojn. Zamenhof substrekas en sia letero, ke por li estis la anoj de Bilu nuntempaj Makabeoj kaj naciaj herooj, kiuj multe devas fari en Israellando, sed ili seniluziigis lin. Li mencias, ke ilia tasko estis tuj koloniiĝi kaj fondi en Israellando unu kolonion post la alia, aŭ unu grandan kolonion. Zamenhof petis ilin, kiel ilia fidela amiko kaj ilia spirita kaj mensa frato, pritrakti la proponon kaj tiel denove akiri la amon de la tuta juda popolo, kiu vidas reale la fruktojn de ilia laboro.

La subskribo: Via amiko L. Zamenhof.

Ni povas nur aldoni, ke post unu jaro de tiu ĉi letero, en decembro 1884, efektiviĝis la anoj de Bilu-movado la programon kaj peton de Zamenhof kaj fondis sian kolonion nomatan Gedera sude de Jafo.

En tiu ĉi letero Zamenhof distingiĝas kiel homo, kiu koncentriĝas ĉiam je unu centra punkto kaj faras ĉion por atingi ĝin. Pro tio, kiam la homoj komencis kritiki la anojn de Bilu-organizaĵo, ke ili faris grandan bruon kaj nenion atingis kaj konstruis en Israellando, sendis al ili Zamenhof leteron, en kiu li mem ne nur akre kritikis ilin, sed montris al ili vojon kaj celon, kiun ili devas atingi per reaktiro la simpatio de la popolo. Krom tio li ankaŭ petis la anojn de Bilu, ke ili ne nomu lin predikanto kaj pritraktu lian realan proponon kaj ne debatu pri li mem. Kaj ni vidis, ke post unu jaro lia propono efektiviĝis.

A. Manor



LETERO DE L. L. ZAMENHOF AL BILU

(klarigo)

En mia artikolo aperinta en Israela Esperantisto n-ro 70, titolita "Letero de d-ro Zamenhof al Bilu", mi informis pri letero de L. L. Z. sendita al Menaŝe Meiroviĉ de Gedera.

Evidentiĝis, ke tiun ĉi leteron skribis ne d-ro Z, sed Ŝaul Pinjas Rabinoviĉ, kiu en ĝi nur menciis la nomon de Z. (temis pri unuiĝo de la grupo Ĥibat-Cion de Z. kun tiu de Rabinoviĉ, ambaŭ en Varsovio).

Do, la letero de Zamenhof, kiun oni trovis en 1972 en la arkivoj de Bilu - organizaĵo en Gedera, ne estis konata ĝis tiam, same ĝia enhavo! Tiun ĉi leteron li sendis al Cukerman de Gedera, kiel respondo al lia letero. La kopio de la letero de C. al Z. troviĝas en posedo de la Universitato de Tel Aviv.

Pri la enhavo de la letero de d-ro Zamenhof al Cukerman - vidu en la paĝo unua.

H. Haroun



4.

HENRY PHILLIPS, JR. (1838-1895)

La unua esperantisto en Ameriko

En mia artikolo aperinta en n-ro 69, IE (septembro 1979), mi pritraktis la vivhistorion de Leo Wiener, kiu meritas la titolon "la unua pra-esperantisto en Ameriko". Nun mi dezirus daŭrigi la priskribon de la frua historio de Esperanto en la Nova Mondo, prezentante kelkajn faktojn pri la unua esperantisto en Ameriko, Henry Phillips, Jr. Li estas menciita en ĉiuj verkoj temantaj pri la tagiĝo de Esperanto-movado, kiam d-ro Zamenhof klopodis akiri oficialan agnoskon por sia lingvo tuj post la eldono de la Unua Libro.

Henry Phillips naskiĝis en Filadelfio, Usono, en 1838. Same kiel Leo Wiener, ankaŭ li estis judo. Li finis siajn universitatajn studojn en 1856, kaj tri jarojn poste estis akceptita en la advokatecon. Tamen, ekde la komenco mankis al li la karakteriza familia interesiĝo pri la juro, kaj li prefere dediĉis sin al antikvaĵaj esploroj, ĉefe la filologio kaj numismatiko. Phillips ankaŭ primajstris plurajn fremdajn lingvojn kaj faris beletrajn tradukojn de germana, hispana, hungara kaj itala poezio. Cetere, li okupiĝis pri la folkloro kaj arkeologio de Usono, kaj dum la lasta jardeko de sia vivo turnis sian atenton al la internacilingva demando.

Rezulte de siaj eminentaj kontribuoj sur la terenoj de la historio kaj literaturo, Henry Phillips estis elektita membro de pluraj klerulaj organizaĵoj. Unu el tiuj estis la Amerika Filozofia Societo (AFS) de Filadelfio, fondita en 1743 de Benjamin Franklin kaj ankoraŭ ekzistanta hodiaŭ, kun vasta agado ampleksanta ĉiujn sciencojn. Phillips fariĝis ano de AFS en 1877, sekvintjare li estis ĝia kuratoro, en 1884 li funkciis kiel unu el ĝiaj sekretarioj kaj de 1885 ĝis sia morto li okupis la oficon de bibliotekisto de la Societo.

En oktobro 1887 Henry Phillips kaj kolegoj estis komisiitaj de AFS formi komitaton kun la celo esplori la efektivigeblecon de internacia lingvo. La komitato komencis kolekti informojn pri diversaj planlingvaj projektoj kaj enketis pri sinteno de kleraj institucioj en la tuta mondo rilate alvokon de internacia kongreso por pritrakti la aferon. La unua planlingvo, kiun la komitatanoj ekzamenis, estis Volapuko, inventita de Johann Martin Schleyer en 1879. En la raportoj publicitaj de AFS:

5.

Volapuko estis ĝisfunde analizita kaj kondamnita kiel netaŭga. Male, kiam Henry Phillips ricevis la francan tradukon de la Unua Libro de D-ro Esperanto en januaro 1888, li entuziasmiĝis pri tiu lingvo, ĉar li trovis en Esperanto plurajn trajtojn, kiujn la komitato mem formulis por ideala internacia lingvo.

Pro ĝenerala apatio la proponita internacilingva kongreso de klerulaj societoj kaj universitatoj ne okazis. Tio ne estis surprizo por Zamenhof, kiu antaŭvidis tiun eventualecon jam en 1888 en la Aldono de la Dua Libro. Malgraŭ tiu fiasko, AFS, ĉefe pro la agado de Henry Phillips, kontribuis por konatigi Esperanton en Ameriko tuj post la laŭco de la lingvo en Eŭropo. Henry Phillips tradukis la Unuan Libron en la anglan lingvon (1889) kaj verkis ankaŭ anglan -Esperantan vortaron. Li, do, estis la tria persono, kiu verkis anglan version de la unua publikaĵo en Esperanto.


Post la morto de Phillips en 1895, AFS ne plu okupiĝis pri internaciaj lingvoj, kaj sekvis breĉo en la historio de Esperanto en Usono ĝis 1904, kiam John Fogg Twombly, kun la helpo de esperantistoj de la pariza grupo, starigis standon ĉe la Monda Ekspozicio en St. Louis por informi la publikon pri la nova internacia lingvo. Tamen, ĉar Henry Phillips dek ses jarojn pli frue komencis agadi por Esperanto, li sendube estis la unua esperantisto en Ameriko.

Restas ankoraŭ dudemandoj. Unue, kion faris tiutempe Leo Wiener, la pra-esperantisto, kiu lernis la unuan formon de Esperanto en 1878 en Varsovio kaj alvenis al Usono en 1882? Ĉu li havis iujn kontaktojn kun AFS, kiam Henry Phillips kaj liaj kunkomitatoj kolektis donitaĵojn pri internaciaj lingvoj? Mi malkovris, ke Leo Wiener ja korespondis kun unu el la komitatanoj, sed ne temis pri internaciaj lingvoj. La poliglota Wiener interesiĝis ne nur pri eŭropaj lingvoj; li studis ankaŭ indiĝenajn lingvojn de Ameriko, ĉefe tiujn de la indianoj de Jukatano kaj Gvatemalo. Kaj unu el la membroj de la komitata triopo estis Daniel Garrison Brinton, pionira usona antropologo kaj etnologo, kiu specialitiĝis pri lingvoj de la amerikaj indianoj. En siaj aŭtobiografiaj notoj, Leo Wiener skribis, ke Brinton sendis al li kelkajn el siaj publikaĵoj kaj kuraĝigis lin rilate lian deziron iri al Mezameriko por studi antikvajn monumentojn. Ĉu Leo Wiener ne sciis, ke Brinton havis en siaj manoj la lingvoprojekton de Ludoviko, kiu jardekon antaŭe en Varsovio in-


struis Lingve Universala-n al Wiener kaj kelkaj aliaj gimnazianoj?

La dua demando temas pri personaj rilatoj inter d-ro Zamenhof kaj Henry Phillips. Ĉu Zamenhof sciis, ke Phillips estas samgentano? Neniu verko en Esperanto, kiun mi ĝis nun legis, aludas la judecon de Phillips; tiun fakton mi ĉerpis el anglalingva biografio pri la filadelfiano. Se Zamenhof estus sciinta tion, li plej verŝajne estus menciinta ĝin en unu el siaj skribaĵoj. Ekzemple, en letero datita 10.VII.1905 sendita al la franca oftalmologo d-ro Émile Javal, li skribis jene: "Tre agrabla surprizo estis por mi sciigo, ke vi kaj s-ro Moch apartenas al tiu sama raso al kiu mi mem apartenas. Des pli bone mi sentos min en Via gastama domo." (Leteroj de Zamenhof, vol. I, . 167). Post la tria Universala Kongreso en Kembriĝo, Zamenhof iris al Londono, kie li gastis ĉe alia judo, Felix Stone Moscheles, brita portretopentristo kaj baptofilo de Felix Mendelssohn. Okaze de tiu vizito en la angla ĉefurbo, Zamenhof estis intervjuita de Izidoro Harris. La esperanta traduko de la angla teksto de la intervjuo, kiu aperis en Jewish Chronicle, estis farita de N.Z. Maimon (La kaŝita vivo de Zamenhof, p.161-173). Unu en la demandoj, kiun faris Harris, kiu mem estis esperantisto, temis pri la nombro de judaj esperantistoj. Zamenhof taksis ilin tiutempe je 300 kaj, parolante pri eminentuloj, menciis, krom la du francoj nomitaj ĉi supre, ankaŭ kelkajn judajn esperantistojn, kiujn li konis. Sed en tiu intervjuo ne estas unu vorto pri la usonano Henry Phillips, do estas preskaŭ certe, ke Zamenhof dum sia relative mallonga perletera kontakto kun Phillips, ne sukcesis ekscii ke ankaŭ la unua amerika esperantisto estis judo.

Bernard Golden,
Hungario



TAGO DE LA FLORO



Kiam A. Holzhaus intencis eldoni la biografion de Trompeter, li skribis: "Se ne Trompeter, Esperanto ne ekzistus". Same li diris pri Silbernik. La celo de la Esperanto-Movado estas ja fariĝi la dua lingvo de ĉiu homo. Sed bedaŭrinde ni ankoraŭ ne atingis la celon. Ankoraŭ troviĝas miloj da homoj kiuj neniam aŭdis pri Esperanto, tamen Esperanto ekzistas dank' al ĉiu kiu lernas la lingvon kaj restas fidela al la movado, penas disvastigi ĝin, propagandas, instruas aliajn kaj dediĉas tempon kaj monon por la Internacia Lingvo.

Dum la 92 jaroj de Esperanto estis multaj elstaraj homoj -verkistoj, poetoj kaj aliaj -kiuj dediĉis sian tutan vivon al esperanto. Sed ni, la esperantistoj, pekas kontraŭ ili, ĉar ni rapide forgesas ilin.

Ni fanfaronas pri "Esperantujo" kaj "familia rondo" sed tuj post kiam iu de ni mortas, li estas forgesita, neniu vizitas la tombon, neniu memoras la mortodaton. Ne miro - do - ke la parencoj de forpasinta esperantisto ofte fariĝas malamikoj de Esperanto.

Dum la U.K. en Lucerno mi proponis ke UEA proklamu la 14-an de aprilo kiel "Tagon de la floro". Ne kiel la britoj aranĝas la "Poppy day" (tago de la papavo), kiam oni kolektas monon por la militviktimoj, sed ni, en tiu tago, la 14-an de aprilo, la mortodato de D-ro Zamenhof, metu florojn sur la tombojn de niaj forpasintaj s-anoj. Laŭ mia plano ĉiu Landa Asocio kaj loka grupo, elektu estraranon aŭ komisionon por tiu celo, kies tasko estos:

1. verki, aŭ prizorgi la verkon de albumo kun foto kaj mallonga biografio de ĉiu forpasinta s-ano.
2. Kontakti la familion de la forpasinta s-ano, por enketi detalojn pri la biografio kaj inviti familianojn antaŭ 14.4 por veni kun la esperantistoj, meti florojn sur la tombon de ilia familiano.
3. Verki aŭ prizorgi la verkon de mapo aŭ diagramo de la tombejo, indikanta la precizan lokon de la tomboj de esperantistoj, multoblige ĝin kaj disdoni kune kun la invitiloj.

U.E.A. ankoraŭ ne decidis pri tio; tamen mi proponas ke ni almenaŭ en Tel-Aviv jam ĉi jare komencu tion. Ĉiu s-ano, kiu povas liberiĝi de sia laboro, lundon la 14-an de aprilo 1980, sin anoncu por prepari la florkronojn kun rubandoj havontaj jenan surskribon:

"La esperantistoj vin memoras
ĉar dank'al vi esperanto floras"

Per tiuj florkronoj ni kune veturos al la tombejo de Holon kun la
parencoj de Israeli, Engelŝer, Gerŝater, Frida Drezner, Ŝtajnfeld kaj
aliaj.

Se ni tion faros, ne nur la familianoj de la forpasinta s-ano
nin ŝatos kaj estimos, sed ankaŭ la neesperantista publiko nin pli respektos.

J. Giladi

Ald. de la red. - Ĉar la propono de s-ano Giladi atingos malfrue la
s-anojn, la dato kiun li proponas estu ankaŭ valida por la venonta jaro.



LA HAĤAMA BUĈILO K LA SEGILO

Okazas ke haĥamo mem malgraŭ pia digno
Trasegi devas pecon eĉ de ligno,
Nu, la buĉilo, sankta pura
(Por buĉ' laŭrita nura)
Segilon ekvidante la apudan
Eklanĉis tuj atakon krudan:
-Ho, kia fifigur' vulgara, abomena!
Malglata k de pikaj pintoj plena!
K grincas per la stumpaj dentoj!
Malpuras ĝi ja tuta, k sen noblaj sentoj.
K ve! Kia indigno!
La vestoj estas nur el ligno!
Sincere mi konfesas
K iame ĉi - strangulon mi ekvidas,
Mil dankojn mi adresas
Al Dio kiu belon kreis k malbelon
K mian sortan stelon
Bonŝance gvidas,
Eĉ skrapeto ununura,



Aŭ makuleto grata
Ja ne troviĝas sur mia pura,
Maldika ŝtalkingeto glata,
Nu, kia miro vere
Se mia mastro pimotive
Karesas min tenere,
Min preĝe pribenante
Ĉielen eĉ okulumante.-



-Vi tute pravas!- diras la segil' naive
(Aŭ eble kun intenco)
Mi ja rekonas mem.
Ĉu min pribenu la piulo?
Ridinda tio estus ja sensenco,
Eĉ vera diblasfem'.
Laŭvere, ĉu mi estas pli ol simpla metiulo?
Mi ja ne lumas, mi ne brilas,
Neniel mi al vi similas.
En ĉi - angul' malluma vi min trovas.
Nur lignon segi mi scipovas.
Sed vi! Vi havas noblan rolon
Vi ja tratranĉas kolon!

La fabla finmoralo
Aldonis iom da kritika salo!
Ankoraŭ ĝis nuntemp' segil', metio -
Makul' en familio.
Sed la buĉil' haĥama ŝancoplenas!
K ĝi buĉadas k oni ĝin pribenas!

El jida tradukis laŭ la fama jida fablisto Eliezer Steinberg
Julius Hecht

LA MILITKAPTITO

Laŭ rakonto de Israel Gold - skribis Uri Oren



Ni faris regulan patrolan rondiron tra la dezerto Sinaj dum la unuaj tagoj post la milito, kiam restaĵoj de la egipta armeo stumblis al la Sueza kanalo.

Estis brulanta tagmeza horo kaj la aero, eĉ cetere sufoka, estis saturita de kadavra fetoro. Ŝajnis, ke la malamiko iĝas de tago al tago pli morta.

Nia regula patrolo konsistis el kvin ŝvitantaj homoj, kun lipoj brogitaj kaj sekaj. La sablo, kiu gluiĝis al nia malseka vizaĝo, faris el ni strangajn figurojn, similajn al vagantoj tra dezerto. Ni pensis pri malvarma biero kaj pri refreŝiga duŝo, forŝovante ĉiun penson pri kadavraj putraĵoj ĉiuflanke.

En la regiono de Ĝebel - Libni ni eniris forlasitan tendaron, por fotografiĝi ni haltis ĉe bela kabano, kiu ankoraŭ antaŭ nelonga tempo servis kiel oficira klubejo.

Homo en krepusko

Antaŭ ol ni turniĝis por foriro, ni haltis apud proksime staranta lada barako. Ŝajnis al mi, ke mi aŭdas neklarajn ĝemojn, penetrantajn el la interno. Mi enŝovis la kapon en la malfermitan fenestron.

Muŝa svarmo kovris mian vizaĝon kaj ondo de haladzo min superŝutis. Neklare mi distingis en mallumo homan figuron, kovritan de ŝvito. Mi etendis la manon rapide al mia Uzi, israela aŭtomata pistolo.

- "La!" ("Ne!") leviĝis malespera elkrio el la lada barako. Kun Uzi en la mano, mi singarde eniris.

Sur la planko, sur amaso de malpuraj ĉifonaĵoj, kuŝis egipta soldato. Lia dekstra kruro estis frakasita kaj liaj okuloj konvulsiĝis pro elĉerpiĝo. Vidante la pistoltubon, direktitan kontraŭ li, li levis siajn brakojn, petante kompaton, sed tuj faligis ilin pro manko de forto.

Rapide klariĝis, ke la viro kuŝas tiel jam de tri tagoj, forlasita de siaj kamaradoj. Ili lasis lin en tiu loko sen guto da akvo, supozante, ke soldatoj de israela armeo lin malkovros. Li tamen - malgraŭ sia danĝera vundo - iel kolektis siajn fortojn kaj malsekigis la lipojn per sia urino.

Ne estis necesaj liaj petegoj, ke mi indulgu lian vivon. Mi tuj sciis, ke mi ne kuraĝos forpreni ĝin. Tro multaj estis la kadavroj, ku-

ŝantaj ĉie ĉirakaŭe kaj tiu ĉi viro - malbonodoro de putraĵo leviĝis jam el li. Neĉion mi deziris pli arde, ol revenigi lin al la vivo. Mi ne pensis pri "Unu soldato malpli" kiel rezulto de la batalo, sed pri "Unu kadavro malpli" - laŭ ordono de la Vivo. Post ses tagoj de detruo kaj mortigado, kiel granda estis en mi subite la sopiro denove krei!

Kvar akvoboteloj

Miaj amikoj alvenis rapide. En malnova leda monujo, kiun mi troviŝ sur lia korpo, mi malkovris bildojn de lia familio: lia edzino, tri infanoj kaj fotografaĵon de lia domo apud Aleksandria.

La vundito ĝemis: "Jam kvin monatojn mi ne vidis ilin. Ili atendas min"...

Ni levis lin singarde kaj metis lin sur molan kuŝejon, kiun ni sternis en veturilo de la komandanto. Li rigardis nin, kvazaŭ li ne kredus. Liaj okuloj estis senbrilaj. "Ĉu vi ne mortigos min?" ...

Ni proponis al li akvon. Li kaptis la akvobotelon kaj sovaĝe trinkis per potencaj glutoj, kvar botelojn unu post la alia. Ni rigardis lin de proksime, konsternitaj, ni kvin barbaj batalantoj, kiuj forlasis sian rolon por fari bonon al la vundita malamiko.

Ni transportis lin al proksima tendaro, kie troviĝis centra kuracejo. Ni ne movis nin de li, ĝis kiam venis kuracisto kun stabo de siaj helpantoj. Ili disinfektis liajn vundojn, bone lin bandaĝis kaj prezentis al li "batalan porcion". La vundito englutis ĉion kun avido de besto. Lia malsato iom mildiĝis kaj nun li observis nin per rigardo de tiu ĉi mondo.

Subite li eksplodis en ploron. Liaj grandaj ŝultroj tremis. Li volis kisi la manojn de ĉiu el ni kaj ne ĉesis balbuti: "Dankon al vi, miaj karaj fratoj! Dio vin benu, bravaj batalantoj!"...

Frato por eterne

Ni turnis nin por foriro. Suno de la dezerto denove brulis en niajn kapojn kaj sabla ŝtormo skurĝis nin kiel dekoj da vipoj. Neniu el ni parolis eĉ vorton.

Post tri tagoj de tiam, dum unu el niaj patroladoj, ni hazarde alvenis al la sama kuracejo. Ni rememoris nian vunditon kaj ni eniris por lin viziti laŭ homa kutimo.

La kuracisto estis tre okupita. "Li estis transdonita en manojn de la Ruĝa Kruco", li diris al ni haste. "Baldaŭ li estos redonita en sian landon."

Ni turnis nin sur la kalkanoj por foriri, kiam li subite ekmemoris:
"Momenton, li ja petis min, ke mi al vi transdonu tion ĉi."


Estis la leda monujo de la egiptano kaj en ĝi bildoj de lia edzino, de liaj infanoj kaj de lia domo. Sur dorso de ĉiu bildo li notis per eta manskribo:

"Al miaj fratoj - batalantoj, revenigintoj de mia vivo. Konservu tion ĉi por eterna rememoro. Danke al tiuj bildoj mi kolektis miajn fortojn ĝis la momento, kiam vi venis savi min. Danke al vi mi povos nun reveni al mia familio. Dio donu, ke venu fino de militoj, Dio donu, ke venu al ni paco kaj ke mi renkontiĝu kun vi por rekompenci vian agon.

Via amiko kaj frato por eterne,

Aĥmed Abdul Raĥman Isa "

el la hebrea tradukis Ota Ginz



FREŜAN FROMAĜON!

(folkloro rakonto)

La Parlamento dum sia sesio decidis enkonduki reformajn ŝanĝojn en la dekreto pri la deviga sabata malfunkciigo de ŝtataj laboroj; dekreto, leĝdonita dum... .. jaro, sub numero paragrafo rimarkoj ^{xx}, ^{xxx}, kaj komento ^{x x x}.

Kolektiĝis la landa rabena asembleo por pritrakti la leĝ-reformon, por esprimi aprobon rilate al ĝi, aŭ por esprimi sian proteston kontraŭ la valideco de la tro progresema novenkonduko.

Petis la prezidanto, ke la partoprenantoj esprimu siajn motivigatajn kaj argumentatajn opiniojn.

Leviĝis la plejaĝa el ili kaj diris:

-Mia forpasinta patro, la fama saĝulo, rabbi Pinĥas ben Aharon, estu bonmemorata li kaj lia memoro, jam tuŝis tiun saman problemon en sia senkomparebla verko: "Spegulo de Ben-Aharon". Laŭ ĝi mi povas absolute kontesti la reformon, pravigante la estintan leĝstaton.

Kaj li multvorte argumentadis por pruvi sian starpunkton.

Post li leviĝis la dua, laŭ grado, rabeno kaj komencis:

-Mia avo, estu laŭtlaŭdata la memoro pri tiu ĉi multfama justulo, rabbi Simon ben Levi, kiu servis ĉefrabeno en la pia kaj altŝatinda komunumo ^{xxx}, instruis min en la senco antaŭe aŭdigita. Tial mi kontraŭas ĉiun reformon, preferante la malnovan leĝon.

Kaj li detale motivigis sian sintenon.

Leviĝis la tria, laŭ graveco, partopreninta rabeno kaj aŭdigis:

- Mia glorfama bopatro, nun preĝanta pri nia bonstato en la ĉiel-lazura ripozejo, - la multefama rabbi Kalman ben Todros, kiu libere naĝas kaj sinkadis reaperante supre el la marprofundo de la ambaŭ Ealmudoj, - la Babilona kaj la Jerusalema, - kune kun ĉiuj iliaj komentverkoj, edukis min pensadi en senco de opinioj ĵus aŭdigitaj. Tial mi aprobas la konteston de la reformo, preferante la ordon pasintan.

Kaj li ekcitis argumente diversajn librojn kaj verkojn.

Same esprimis sin ĉiuj ceteraj ĉeestantoj. Ĉiuj komencis siajn referatojn, unue menciinte sian noblan devenon, kiel filoj, nepoj, aŭ parencoj de multkompetentaj kaj tre aŭtoritataj rabenoj. Kaj ili ĉiuj citadis la verkojn, laŭ kiuj ili bazis siajn opiniojn. Sed ĉiuj ili kontraŭis ian ajn reformon, konservative preferante la antaŭan staton.

Fine, la prezidinto vokis por sin esprimi, la lastloke, en angulo, nerimarkeble sidintan modestan, ĉar ne gravan rabenon, sufiĉe ankoraŭ junan laŭvide.

Leviĝis tiu, tuse te trapurigis la gorgon kaj mallaŭte, sen memfideemo diris:

- Mi treege bedaŭras... mi ne povas fiere konstati altpozician devenon ... ĉar ne havas gravajn parencojn. Mia patro estis simpla laktisto... Li vendadis laktproduktojn en sia butikoj. Mi ne povas min apogi je lia verko. Tamen mi povas lin citi. Ĉar li instruis al mi tre utilan teorion. Li diris; "Filo mia, sciu, ke ĉia konstato similas al ... fromaĝo. Malnova fromaĝo mucidiĝas, kovriĝas per ŝimo kaj putrante fetoras. Elĵetu ĝin! Uzu nur freŝan!"

J. Kohen-Cedek



K O N T R A Ŭ L I N G V A B A T A L O

Al la 100^a datreveno
de la IVRIT-renaskiĝo



Laŭ informoj, en Sovetio estas
arestataj instruistoj de la lingvo
I V R I T *

Ĉu vi imagas, ke iam ekzistis
lingvo, al kiu ŝtatoj rezistis?
Jes, ĝi ekzistis! Estis ĝi kreo
de l' bjalistok - varsovia hebreo.
Lingvo neŭtrala, lingvo racia,
lingvo por ligi diversajn naciojn.
Grandaj tiranoj Hitler kaj Stalin
kontraŭ la lingvo provis batali.
Nomoj iliaj jam fiodoras,
sed Esperanto plue disfloras.

Ĉu vi imagas, eĉ nun ja ekzistas
ŝtato, kiu al lingvo rezistas.
Sed ne al Lingvo Internacia.
Malpermesita nun estas ja nia
lingvo hebrea, lingvo antikva,
lingvo de nia fama "Hatikva",**
lingvo de nia iama disfloro,
lingvo de la pasintec' nia glora,
lingvo de nia batalo hebrea
por sendependo por ŝtata rekreo.
Eĉ unu fraz', unu vorto ivrita
en Stalinujo estas malpermesita.
Spite ĉi-tion kaj malgraŭ ĉi-tio
paŝas ivrit tra Sovetio.
Spite danĝerojn, minacojn, postulojn,
lingvon instruas ivrit-volontuloj.
Spite al risko kun granda fervoro
pluen daŭrigas tia laboro.
Ja kion fari, se ŝtato rezistas?

Ŝtato rezistas, sed ili ekzistas.
Ŝtato ne cedas, sed ili persistas.
Ili obstinas en siaj insistoj.

Gloron al bravaj ivrit - instruistoj!

Ŝ. Mizeruĝa

* Ivrit - ŝtata hebrea lingvo en Israelo
** Hatikva - La Espero - hebrea nacia himno, ŝtata himno
de Israelo.


J A M N E G R A V A S

Jamtute ne gravas
Ĉu vi havas aŭ ne havas
Senton en via kor'
Vi la manojn lavas
La konsciencon savas
De ĉia pasinta memor".

Kiĉon forgesi mi devas
Pri tio mi nevas
Dum nokto kaj tag'
Kiam l' okulojn mi levas
La kor' al mi krevas
Kiel trafita de sag'.
La ver' vin turmentas
Vi ĉion dementas
Kvazaŭ nenio ekzistis
Vi indiferentas
Nenion vi pentas
Kvankam mi ofte insistis.
Nun ĉion kovras jam forges'
Bedaŭro ne plu restos
Ja venos nova amkares'
Mi ĝin kun ĝojo festos.

Muŝpelant!





Luktado de l'financministroj kaj ŝtataj bankestraroj kontraŭ ekscesa mono-cirkulado estas, sendube, unu el la plej elstaraj trajtoj de nia inflacia epoko. Registaroj dekretas kredito-restriktojn, investas sukcese novajn impostojn kaj forprenas eventualajn profitojn de bankoj per ĉiuj home elpenseblaj rimedoj. Tiucele la popolo kunlaboras, nome en formo de pli kaj pli modernaj rabo-atakoj en bankdomoj.

RABATAKO EN BANKO KIEL KUTIME !!! ...

Komence de ĉio ĉi mi ricevis de Vajnreb ĉekon pri 16 liroj pagendaj de Abu-Kabir-filio de Leumi-banko. Mi veturis tien kaj transdonis mian ĉekon al por tio kompetenta oficisto.

Tiu oficisto rapide rigardas la ĉekon kaj samtempe - li iomete strabas - la plej freŝdatan konto-folion de Vajnreb dirante:

"Bone. Vi ricevos monon ĉe la kaso." Mi paŝas al tiu giĉeto, kiun li montris al mi: "Ŝalom," mi diras.

"Kion vi deziras?" la kasisto demandas.

"La monon," mi sincere respondas.

"Kompreneble," diras la kasisto kaj prenas el monŝranko malantaŭ si banknoto-ligaĵojn por transdoni ilin al mi.

"Kial tion?" mi demandas.

"Mi obeas vian ordonon. Ĉe rabo-atakoj mi neniel rezistas."

Mian fortan kaj laŭtan ekridon li ŝajne ne komprenas, minimume ne en ĝusta senco.

"Ha, ha, ha," li afekte imitas min. "Tre komike, ĉu ne? Jen, temas ĉi-monate, jam pri kvina rabo-atako."

Mi klopodas klarigi al la kasisto, ke mi havas neniun armilon ĉe mi kaj deziras nur mian monon.

"Sinjoro Zinger!" la kasisto sin turnas al oficisto sidanta ĉe plej proksima skribotablo. "Bonvolu veni ĉi-tien nur por momento. Ĉar temas ĉe ni ŝajne pri iomete konfuza bank-rabisto." "Tuj!"

Sinjoro Zinger finas tiumomentan okupon kaj venas al ni kun amaso da monbiletaj ligaĵoj. "Pli hodiaŭ, bedaŭrinde, ne troviĝas en nia kaso. Nur venontan vendredon, kiam salajroj denove estos pagataj. Cetere, kiel vi ne portas ŝtrumpon antaŭ via vizaĝo?"

"Ĉar ĝi tiklas." Estas stranga kaj por mi neniel ĝojiga situa-

cio. Ĉirkaŭ mi scivolaj homoj premas unu la aliajn, grimacas kaj gestoriĉe parolas unu kontraŭ la aliaj. Unu en ili klopodas atingi la enirejon, kie la edzino atendas:

"Venigu la infanojn! Rapidu! Ĉi tie okazas rabo-atako." La alte amasigitaj monbileto-ligaĵoj ankoraŭ kuŝas antaŭ mi. Ankoraŭ mi penas klariĝi al sinjoro Zinger, ke mi tute ne intencas preni ilin.

"Prenu do!" sinjoro Zinger volas kuraĝigi min. "Nia banko ja estas asekurata."

Kiel mi krome ekscias, antaŭ nur unu semajno du malgrandaj knabinoj prirabis la filion en Jafo, kaj la tiea filiestro sciigis al Zinger, ke sekvus la Abu-Kabir-filio. De tiam Zinger, atendante tiun rabo-atakon ĉiam havas pli grandan sumon da kontanta mono je sia dispono. "Parto de kliento-servo de niaj israelaj bankoj," li atentigas min ne sen iom da fiero. "Intertempe ni ellaboris regularon pri sinteno, laŭ kiu ankaŭ niaj klientoj konformigu sin. Kaj ĉio ruliĝas kvazaŭ sur senfina bendo."

Fakte: La klientoj kaj vizitantoj, kiuj dum mia rabo-atako estas en la giĉetejo de l'banko kuŝas sur la planko kaj tie estas gardataj kaj servataj de oficisto. Poste ili rampas sur manoj kaj piedoj singarde al elirejo. Aliaj eniras sammaniere.

"Antaŭ multaj jaroj," sinjoro Zinger pluinformas min, "rabo-atakoj kontraŭ bankoj okazis ankoraŭ laŭ klasika ceremoniaro. Penetrantaj rabistoj surhavis maskojn, timige pafis en la plafonon, bruis kaj minacis. Nun oni laboras pli nature kaj dece. Pro tio israelaj bankoj laŭeble favoras tiun pli facilan procedon. Antaŭ kelkaj tagoj, ekzemple, du viroj nur ekipitaj per du simplaj ŝraŭbtiriloj malplipezigis Barkleys-bankon en Ramatajim je 100000 IL. Kaj en domo de Leumi-banko en Petaŝ Tikva oni jam nur tenis lekum-glaciaĵon antaŭ la buŝo de giĉeto-oficisto. Kaj tio funkciis. Hieraŭ la Diskonto-banko en Ĥjafa en gazeto publicis anoncon petante bankrabistojn dum someraj monatoj laŭeble aranĝi siajn atakojn nur lunde, merkrede kaj ĵaŭde."

"For la burĝokratismon," mi aldonis.

"Vi malĝuste prijuĝas tion," Zinger opinias. "Estas ideala situacio, pri kiu Hercel kuraĝis ankoraŭ ne revii. Nun ankaŭ ni en Israelo havas niajn krimulojn. Finfine ni estas normala popolo, Batja," li sin turnas al sia sekretariino. "Ĉu vi alkonektis la policon?"

"Jes," Batja respondas kaj plutraktas maĝumon inter siaj dentoj.



"Sed tiu telefona numero estas senĉese okupata."

"Do, finu viajn provojn!" Zinger diras.

Dum mi eknombas la staplitajn monbiletojn antaŭ mi, mi informiĝas ĉe Zinger, kial oni ne havas alarminstalaĵojn tie ĉi. "Pro netolerbla bruego" Zinger klarigas al mi. "En la Hapoalim-banko la alarmsonorilo antaŭ kelkaj tagoj sonoris dum rabo-atako tutan horon. Kaj tiu bruo kaŭzis nervajn ŝokojn ĉe multaj dungitoj."

"Kaj kie troviĝas viaj armitaj gardistoj?" mi scivolis.

"Ie ajn ekster la domo. Je ĉi tiu horo nia ĉefdirektoro promene akompanas siajn hundojn. Dume oni, kompreneble, devas gardi lin."

Intertempe la kasisto kun du kofretoj, kiujn la banko kompleze disponis kaj kiuj enhavis la zorge pakitajn monbileto-bigaĵojn, demandis min, kie mi do, parkis mian ŝtelitan eskapaŭton. Kiam mi forlasas la bankodomon, sur la strato multaj atendantaj homoj ĉirkaŭas nin por per siaj kameroj nepre ricevi surprizan portretofoton de mi. Ili petis min, do minimume per nazotuko maski mian vizaĝon kaj ne tiom stulte rikani.

Ĉe la fino de l'strato policistoj konstruas barikadon.

Mi ankoraŭ rapide donas kelkajn aŭtografojn kaj lastfoje vane klopodas redoni la monon al la banko. Sed Zinger ĝin emfaze rifuzas:

"Ne necesas! Ne necesas! Ni jam informis nian ĉefadministracion.. Kaj nia asekur-asocio jam kalkulas kaj kompensos tiun perdon. Bonvolu eviti komplikaĵojn! Restu, do, mi kore petas vin ankoraŭ kelkan tempon ĝis la TV-raportistoj venos.

Sed pri tiom da tempo mi bedaŭrinde ne disponas. Per elkora manpremo adiaŭas sinjoron Zinger kaj veturas al la plej proksima benzinstacio.

"Kiom da?" demandas la staciestro.

"Plenigu!" mi respondas.

La staciestro malfermas la kofrejon de mia aŭto, en kiun li ĵetas ĉiun monon, kiun li havas ĉe-mane.

"Ĉu vi bezonas kvitancon?" mi demandas.

"Ne, koran dankon! Mi estas asekurita."

Domaĝe, mi pensas survoje hejmen. Tro domaĝe, ke ni ĝuste nun havas tiom intensan inflacion en nia lando, kiam ni finfine fariĝis normala popolo!

Tradukis: Gerhard Ziegler
(okc. Germ).

LA LIRO FORPASIS. VIVU LA NOVA SIKLO!

Niaj eksterlandaj legantoj eble ne sukcesos deĉifri unu noton sur la paĝo 21 de tiu ĉi revuo, aperanta en la anonco pri la jarkotizo por ELI. Temas pri la vortoj "180 IL aŭ 18 IS".

Do, vi povas kotizi por nia Ligo 180 israelajn lirojn aŭ 18 israelajn siklojn, laŭprefere. Sed sciuj, ke la valoro de ĉiu el la du sumoj aparte estas la sama, ĉar ek de februaro 80-a, la 32-jara liro estas iom post iom anstataŭigata de ĵusnaskita ŜEKEL (esperantlingve: siklo).

Nia registaro decidis ŝanĝi la ŝtatan monunuon, eluzante la okazon por forstreki unu nulciferon el ĉiuj sumoj. Tio signifas, ke ĉiu nova israela siklo (IS) havas valoron de 10 israelaj liroj (IL). Do, post kelkaj monatoj (aŭ eble jaroj?) ni havos nur biletojn kaj monerojn de sikloj kaj ne plu pagos (eĉ ne plu ricevos...) per liroj. Ĉu la vivo tiam estos pli agrabla, se ni pagos 1 monunuon anstataŭ 10, 10 siklojn anst. 100 liroj ktp.? Eble ne, ĉar la salajro malgrandiĝos respektive...

Sed eĉ se ne, almenaŭ la ŝanĝo de la nomo de nia valuto estas pozitiva. Anstataŭ la fremda nomo "liro", ni havas nun nomon, kiu originas el la Biblio - Ŝ E K E L. Jam la unua negoco priskribita en la unua libro, Genezo, estis farita en sikloj (hebree: "ŜKALIM", la pluralo de "ŜEKEL"). En ĉapitro 23 ni legas pri Abraham, kiu aĉetis de Efron la Ĥetido la kavernon kaj la kampon en Ĥebiron kiel tomban posedaĵon: "Kaj Abraham pesis al Efron la monon, ... kvarcent siklojn da arĝento, uzata en la komerco".

Siklo da arĝento servis kiel valuto ne nur en Antikva Israelo. En PIV ni legas: "Siklo - mezunuco pri pezo kaj mono, ĉe la Egiptoj kaj Hebreoj (= ĉ. 6 gramoj)". Fakte la sistemon de pesado de arĝento, oro aŭ alia metalo oni uzis unue en Babilono kaj nur poste en Kanaano. La radikoj de la hebrea vorto Ŝekel estas ŜAKAL, kio signifas "pesi".

En la plej antikva tempo oni ankoraŭ ne uzis la sistemon de pesado de metaloj. Tiam servis kiel pagilo diversaj objektoj utilaj kiel brutaro, salo, armiloj, ornamaĵoj ktp. Poste oni uzis tiucele metalojn, kiel arĝenton, oron kaj kupron. Oni simple pesis la metalon, same kiel faris Abraham pagante per sikloj da arĝento. Nur poste oni muldis la metalojn, kiel monerojn (metalpecojn), simile al la nunaj moneroj aŭ medaloj. En la historio de la judoj famiĝis la moneroj nomataj "Sikloj de Israelo", kiu

estis emisiitaj de la Ĥaŝmonaidoj en Judujo.

Reveni al la fontoj, kombini la nacian pasintecon kun la nuntempo, estas laŭdinda. Ni ĉiuj esperas, ke la novnaskito estos simbolo de nova epoko pli bona kaj prospera ekonomie kaj socie. Ni deziras al la siklo "sanon" kaj "forton", almenaŭ pli da ili, ol havis nia senlora IL. Ni esperu, ke post 5 jaroj la legantoj de Israela Esperantisto ne devos pagi 180 IS kiel jarkotizon. Ni ĉiuj estas esperantoj, ĉu ne?

J. Semer



EL NIA MOVADO KAJ AGADO


1. En la semajna soldata gazeto Bamaĥane aperis en januaro longa artikolo pri Esperanto, titolita "Lingvo de Espero". Ĝi inkludis ankaŭ intervjuon kun D-ro H. Maŝler kaj A. Vandel.
2. En la ĉiutaga metena radiprogramo Joman Cahal (ĉe la armea radiostacio) oni dissendis en januaro mallongan raportaĵon okaze de la 120 - jara datreveno de la naskiĝtago de D-ro L.L. Zamenhof.

KURSOJ DE ESPERANTO

1. Tre sukcesan finon havis la unua kurso de Esperanto okazinta en la politeknika altlernejo Teĥnijon, Hajfo. La kurso, kiun gvidis s-anino Anat Zajdman, daŭris la tutan semestron kaj ĝian finan ekzamenon atingis 20 studentoj. Dum la dua semestro de la studjaro okazas dua simila kurso por komencantoj.
- La okazigo de la kursoj en Teĥnijon kadre de la oficiala studfako ebligis ĉefe dank' al la penado de la studentoj - samideanoj Avi Gal kaj Gadi Meir.
2. Alian kurson en la sama urbo, Hajfa, gvidas Jehošua Tilleman ĉe la klubo de la vegetaranoj.
3. En la Junulara Centro de Tel Aviv daŭras kursoj de D-ro H. Maŝler kaj J. Murĵan.
4. S-anino Dora Wunderbaum gvidas kurson de Esperanto en la klubo de la Pensiuloj ĉe str. Rajnes, Tel Aviv.
5. En la klubejo de E.L.I. (Bejt Jad Labanim, Tel Aviv) ĉiam daŭras la perfektiga kurso por progresantoj. Ĝi okazas ĉiuĵaŭde ek de 19⁰⁰. Gvidas ĝin D-ro H. Maŝler.

KLUBAJ VESPEROJ

D-ro H. Maŝler	Vizito en Rumanio
" "	Lumbildoj de Rumanio
M. Vinograd	Filmo de Svedio
R. Klajman	La karaitoj
S. Zalmanoviĉ	La esperanta literaturo
E. Haroun	Inteligenteco
. Drezner	Interkamarada konversacio
D-ro H. Maŝler	Religio en niaj tagoj
A. Vandel	Lumbildoj el Esperantio



Amikeco trans limoj

JARKOTIZO POR ELI / ABONTARIFO POR IE

Ĉiuj Israelaj legantoj estas afable petataj pagi la jarkotizon por ELI - membreco (180 IL aŭ 18 IS inkl. abontarifon).

Kromaj monkontribuoj estos ricevitaj kun granda danko.

Abontarifo por eksterlandaj legantoj: 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

La kotizon por UEA/Esperanto oni povas pagi al s-anino Raaja Klajman, Tel Aviv, str Arlozorov 119.



D O N A C O J

N. Drezner (anstataŭ honorario al d-ro Maŝler):	500 IL.
S. Singer (anstataŭ honorario al d-ro Maŝler)-100 fr. frankoj:	927 IL.
Eva Bork (Berlino) - 90 germ. markoj:	1900 IL.
Al ĉiuj tre koran dankon!	

ELI